## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**la 13-an de novembro…**

ni manĝos fonduon

ĉe la restoracio

**« Les Trois Sifflets »**

rue du Simplon 1, 1800 Vevey.

Organizas Charlotte Blanc Maillard

021 922 34 74 / 079 393 32 63 75

la 4-an de decembro

ĉe Cléa Robin

ch. Culaz 20, Vouvry

024 481 33 06 / 079 330 04 03

Ne forgesu aliĝi ĉe:

http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd#

## Citaĵo


*Mi dezirus, ke oni instruu esperanton en ĉiuj urbetoj kaj urboj.Tio estus faktoro por la interkompreno de la popoloj kaj la plej certa maniero por firmteni la universalan pacon.*

*Léon Blum*

## Enigmo

S-ro Akvotrinkemulo ne ankoraŭ dormas. Li aŭdas la narbarojn, kiuj tintigas siajn glasojn. Li nombras 21 tintigojn.

Kiom da personoj festas, sciante ke ĉiu tintigas unu-foje kun la aliaj ?




## Laŭzana Esperanto – Societo

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22

+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

**www.facebook.com/societedesperanto.lausanne**

Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

novembro 2015 – n° 9

**Lunde, la 2-an de novembro je la 20-a**

en "Espace Dickens", Dickens 6, Laŭzano

… parolos al ni

Karlota kaj Rosario

**pri la 100-a UK en Lillo**

**Sabate la 19-an de decembro**

*Zamenhofa Festo*

*(Programo en la venonta informilo)*



## *2015 - 2016*

**Lunde la 4-an de januaro**

*Decidota*

**Lunde la 1-an de februaro**

*Ĝenerala asembleo ordinara*

**Lundi la 7-an de marto**

*Decidota*

# ! Ekspozicio pri Esperanto !

Ne forgesu viziti ĝin. Invitu viajn amikojn kaj parencojn veni kaj malkovri la lokon kaj la gravecon de la Internacia Lingvo en nia regiono, en nia lando, en la mondo.
Ĝi okazas en la urbodomo de Laŭzano, placo La Palud, ĉiutage de la 26-a de oktobro ĝis la 7-a de novembro, krom dimanĉe, inter la 10-a ka la 18-a.

# Koncerto kaj prelego de Manŭel Rovere




## 4-an kaj la 5-an de oktobro.

Francisko organizis la venon de Manŭel enlaŭzane.
Sabate, je la 18-a, kun granda plezuro ni bonvenigis lin kaj vespermanĝis kune en la bufedo de la stacidomo. Li alvenis kun amaso da materialo, kiun li instalis en nia nova loko « Espace Dickens ». Post longa tempo finfine ĉio estis preta por la morgaŭa kunveno. Manŭel bone dormis en la hejmo de Marie-Antoinette kaj Knud.

Dimanĉe matene, je la 10-a, preskaŭ 20 membroj partoprenis la kantatelieron. Manŭel kantis kaj kantigis nin. Ĉiu povis « karaokei » laŭ granda ekrano, kie oni legis la tekstojn de la kanzonoj. Ĉiuj el ni havis grandan plezuron aŭdi kaj legi tiujn popularajn kantojn multe konatajn de ni, almenaŭ la melodion.

Posttagmeze je la 15-a komenciĝis la koncerto. Aŭskultante ĉi tiujn kantojn ni aprezis la amdeklaron de Manŭel al la vivo. Ni vojaĝis inter multe da landoj kiel Meksikio kun *Ĉieleto Linda*, Britio kun *Knabino, Hieraŭ mi*, Usono kun *Fremdaj en la nokt'*, Francio kun *La vivo rozkolora, La Fremdul'*, Hispanio kun *Kisu min multe* kaj *Manuela*, el Italio venis *Marina, Saporo de salo*, *Nun aŭ neniam*, la tre bela *Tango de la Rozoj* kun mirinda dancparo kaj multe aliaj kantoj. Mi ne volas forgesi la kortuŝan kanton pri la kato. Tio montras, ke Manŭel estas ne nur granda artisto, muzikisto tradukisto sed ankaŭ helpanto de la homoj kaj de la bestoj. Li diras, ke li estas nur amatoro sed ne kantisto. Por ni li estas vera kantisto, kiu vere kortuŝis nin.

Lunde matene Jun kaj Dieter, kiuj venis el Interlaken, Manŭel kaj mi, ni kune piede vizitis Vevey. La vetero estis tre bela kaj mi havis plezuron montri al ili tiun ĉarman urbeton. En Montreux, en la bela domo de Marie-Antoinette kaj Knud, ni rakletumis. Jun malkovris tiun svisan pladon. Dum longaj horoj ni parolis senfine, en Esperanto, pri la lingvo kaj gramatiko, Manŭel kaj Dieter vigle defendis siajn vidpunktojn. Tio estis por ni vere tre tre bona ekzerco. Je la 18-a niaj amikoj el alemana Svislando forlasis nin kaj ni veturis al Laŭzano por la kutima lunda kunveno. Kelkaj membroj atendis nin por aŭskulti la prelegon de Manŭel. Laŭ la demandoj li klarigis pri sia vivo, sia ammuziko, siaj instrumentoj. Dum sia junaĝo li amegis muzikon, studis ĝin kaj lernis ludi gitaron per si mem kaj kun amatoraj grupoj. Li estas elektroteknika inĝeniero. Li estas idealisto, kiu pensas, ke la homaro sukcesos en sia revo pri tutmonda homa familio. Li vere estas tro modesta, ni ĉiuj plezuris aŭdi kaj paroli kun li. Ni malkovris fervoregan personon, li vere ravis nin. Mi povas diri, ke estis mirinda evento kaj ke la neĉeestantoj vere malpravis.

Mi dankas vin ĉiuj kaj deziras al vi ĉion bonan. Pensu pri tiuj belaj paroloj de Manŭel :

**« Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon. »**

Ĉu vi konsentas ?

Charlotte Blanc Maillard - Vevey